Heinrich Heine,

En dolĉega Maj'

tradukita de Friedrich Pillath

Printempe en dolĉega Maj',
Dum la burĝonoj krevis,
El mia koro ĝerme
Amsento sin eklevis.

Printempe en dolĉega Maj',
Dum birda kanto sonis,
De l' kora mi sopiro
Konfeson al ŝi donis.

Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* FRIEDRICH PILLATH *(†1932-04.03).*

Arg-203-434 (2015-04-09 15:05:52)

Tiu ĉi traduko aperis en Elektitaj Poemoj, Berlin: Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek (2a eldono), 1920, p. 13. La origina germana-lingva versio troviĝas en la „Libro de la kantoj", sekcio „Lirika intermezo" (1822 - 1823), n-ro I. Pri F. Pillath vidu ankaŭ la vikipedian retejon `http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath`.

Heinrich Heine,

En Majo

tradukita de Manfredo Ratislavo

En Majo, kiam ĉiuj
Burĝonoj malfermiĝis,
La amo kiel floro
En mia kor' estiĝis.

En Majo, kiam ĉiuj
Birdetoj sin aŭdigis,
Al ŝi deziron mian
Sopiran mi sciigis.

Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1982-11-14.*

MR-002-4 / Arg-203-403 (2004-04-05 20:37:00)

La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj", sekcio „Lirika intermezo" (1822 - 1823), n-ro I.

Heinrich Heine,

En admirinde bela maj'

tradukita de Hans-Georg Kaiser

En admirinde bela maj',
dum jam burĝonoj krevis,
jen ankaŭ miakore
la amo sin eklevis.

En admirinde bela maj',
dum birdotril' senbridis,
jen mi al ŝi sopirojn,
dezirojn, ekkonfidis.

Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* HANS-GEORG KAISER *(Cezar, ∗1954-05-21).*

Arg-203-431 (2004-03-24 07:33:04)

La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj", sekcio „Lirika intermezo" (1822 - 1823), n-ro I. La traduko estas korektita laŭ la lasta ŝanĝo, kiun faris s-ro Hans-Georg Kaiser en 2004-03-21.